
# starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1978 · 3 · (67)

SPECIALA STERKAĴO KUN KONCENTRAĴO DE PLANTAJ NUTRAJ SUBSTANCOJ KAJ MIKROELEMENTOJ

# »HERBAFERT« 1

TAŬGA POR ORNAM - PARKOJ, ĜARDENOJ, PRECIPE POR HERB - AREOJ KUN ORNAM - ARBEDOJ, KONIFEROJ KAJ PERENOJ.
ĜI HELPAS AL LA RAPIDA KRESKO KAJ GRANDA DENSECO DE LA KRESKAĴOJ.

**Produktas: nacia entrepreno**

**BARVY A LAKY NP**

**závod 5 - Praha 10 - Uhříněves**

# UNICHEM

## PARDUBICE

**TRUST PODNIKŮ CHEMICKÉHO PRŮMYSLU**

# Internacia Lingvo — Internacia Edukado

Tiuj ĉi kvar vortoj signas la temon de la nunjara Universala Kongreso de Esperanto. Oni pritraktos ĝin en la ĝeneralaj kunsidoj de la Universala Esperanto - Asocio. Ni legis en la dua kongresbulteno, ke okazos du ĝeneralaj kunsidoj de UEA, en kiuj oni pritraktos krom la kongrestemo ankaŭ la UEA agadon el la lasta laborjaro.

Estas vere malfacile imagi, kiomfunda povos esti la traktado pri ambaŭ programpunktoj. Konsiderante la amplekson de la UEA-laboro - ĝian multflankecon, la vastecon de la agadaereo, la novajn surprizajn fenomenojn sur la ne-eŭropa laborkampo - la ŝatantoj kaj apogantoj de la kongrestemo ne nur tiom alloga, sed ankaŭ urĝe aktuala, prave kaj zorgeme demandas, kiom da tempo kaj energio restos en la nur du kunsidoj por trakti ankaŭ pri la rolo de la Internacia Lingvo en Internacia Edukado: se konscie prilaborata,la temo ja povus okupi tutan kongres-semajnon ...

Sendube neniu Esperanto-aktivulo povis preteratenti la lastatempe potence pulsantan movadon en Esperanto - rondetoj en ĉiuj gradoj kaj tipoj de lernejoj, de la bazaj ĝis la altaj. Ĉar edukado komenciĝas ĉe la bazaj, kaj Esperanto - edukado nun forte manifestiĝas inter infanoj - kaj ankaŭ ĉar simpligo helpas pli facilan rezonadon, ni parolu pri edukado de infanoj.

Miloj da infanoj lernas Esperanton kaj akiras per tio novajn perspektivojn pri la mondo kaj la vivo kaj kunvivado en ĝi. Ili lernas lingvon, kies senco kaj celo estas faciligo de interhomaj rilatoj kaj pli bona kompreno de la nuntempaj klopodoj pri sanigo de tiuj rilatoj individuaj kaj grupaj, trans la limoj landaj kaj sociaj. Grandaj internaciaj konferencoj okazas por akceli pacan kaj tolereman kunvivadon de nacioj malgraŭ la kelk-kaze grandaj diferencoj soci-ordaj kaj politikaj. La Esperantistoj bone komprenas kaj grave subtenas de ĉiam tiun ĉi fortan ondon - ili ja levis ĝin jam

multajn jarojn antaŭ la nuntempa strebado de registaroj. Antaŭ mi kuŝas propaganda bildkarto bone konata al tiuj ĉi malnovaj batalantoj por paco, kontraŭ rasismo kaj koloniismo : la bildo montras diversnaciajn, diversrasajn homojn de diversa haŭtkoloro; ili premas reciproke la manojn, kaj Esperantovortoj proklamas ilian internacian amikecon.

En nia lando kaj en multaj aliaj formiĝas lernejaj rondoj de internacia amikeco. Niaj kunlaborantoj fervore aliĝis al la organizantoj de la rondetoj. En multaj rondetoj ili instruas Esperanton kaj helpas eduki al internacia amikeco. Pri la radikiĝo kaj praktika uzo de la Internacia Lingvo atestas la multaj korespond-petoj en Esperanto-gazetoj: ili estas alvokoj pri internacia amikiĝo de infanoj. Niaj propraj Someraj Esperanto-Tendaroj kunigas ĉiujare po (rondcifere) du centoj da novaj Esperantistetoj.

Tiuj ĉi faktoj devus esti la bazo por la kongresa agado en Varno. Ni preparu jam nun nian parton por la Internacia Jaro de Infanoj 1979! La faktoj alportas kun si multon da novaj problemoj. Malkaŝi kaj solvi ilin devus esti la rezulto de la traktado. Unu el la plej malfacilaj solvoj estas pri tio, kiel labori kun la infanoj plu post finiĝo de la porinfana Esperantokurso, kiel procedi, por ke ĉi tiu grandioza pac-armeo ne estu perdita por nia movado kaj por la pli feliĉa vivo en la mondo.

/ver/

## STARIGO DE ESPERANTISTA ASOCIO EN USSR APROBITA

Laŭ la informo de profesoro Magomet Isaev el Moskvo, la ŝtataj aŭtoritatoj aprobis starigon de la esperantista organizaĵo en Sovetio. Nuntempe oni prilaboras la regularon de la nova asocio, kiu agados enkadre de la supera kultura institucio - Ligo de amikecaj societoj.

La alia decido rilatas eldonon de centra gazeto por la sovetaj esperantistoj. Ambaŭ decidoj estas gravaj pro la tutmonda esperantistaro.

La fremdlingva ĵurnalo "Moskvaj novaĵoj" aperigis la 11an de marto 15paĝan aldonon en Esperanto - la raporton de L. Breĵnev pri la projekto de la nova konstitucio de USSR.

# La tria lingvo en la kosmo LA ĈEĤA



Ĉeĥoslovakio estas, post Sovetunio kaj Usono, la tria ŝtato en la mondo, kiu sendis sian reprezentanton sur ĉirkaŭteran orbiton. La ĉeĥa lingvo eksonis el la kosma spaco per la buŝo de la unua ĉeĥoslovaka kosmonaŭto, Vladimír Remek.

La ĉefo de la kosmonaŭta trejnejo en USSR, generalmajoro Ŝatalov, menciis en ĵurnalista konferenco pri la t.n. lingva bariero. Ekzistas jam, tiurilate, certaj spertoj. Ĉe la komuna flugo de la kosmaj ŝipoj Sojuz kaj Apollo validis la principo, ke la trejnado okazu en la lingvo de la lando, en kiu ĝi ĝuste okazas: en Sovetio ruse, en Usono angle. Sed kelkfoje oni trejnis ankaŭ en la lingvo de la alia lando. Por la fakaj bezonoj evoluis, poŝtupe, ankaŭ rusa-angla slango, nomita populare "ruston".

En la kadro de Interkosmos (enkosma kunlaboro de socialistaj landoj), la oficiala lingvo estas la rusa. Sole siajn sampatrujanoj la alia kosmonaŭto povas saluti en sia propra lingvo. Post la ĉeĥa sekvos la pola kaj germana (aŭ inverse), la hispana, hungara, mongola ktp.

Pli vasta internacia kunlaboro ĉe pilotataj flugoj evidente postulos dulingvismon: la rusan kaj la anglan lingvojn kun eventuala alpreno de la "rustono".

TRANSPORTA

nacia entrepreno, Chrudim

projektas, produktas kaj muntas
ekipaĵojn por longdistanca
bendtransporto en enteraj
minejoj

ekipaĵojn por deponeja mastrumado
plue ĝi elfaras levĉarojn kun flanka ŝarĝeblo de portkapablo 5t
kaj 6,3t kaj devirsspecajn pesilojn

La popularscienca elsendo "Meteor" de Radio Praha preparas programon pri laboroj por konsistigo de "artefarita lingvo por kosmonaŭtoj".

/J.M./

Solidaran saluton okaze de la sukcesa kosma flugo sendis al ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj Moskva Internacia Esperanto-klubo. En ties nomo subskribis la leteron prof. V.Jusković kaj S.Krajnov.

## DONACOJ AL ĈEA

Čálek Pavel, Praha 15,-- Kčs, Arch.J.Drlík, Praha 185,-- Kčs, MS ČES Herbortice 10,-- Kčs, Soňa Zedníková, Praha 15,-- Kčs, Kuchař Josef,Praha 6,-- Kčs, Josef Jerie,Desná 349 100,-- Kčs, Jos. Kuchař, Praha 300,-- Kčs. Koran dankon al vi ĉiuj!

ARTIKOLARON pri la monda lingvoproblemo kaj ĝia solvo aperigas la semajngazeto "Svět práce". La unuan parton vi trovos en la 21-a numero (eld. 24.5.1978).

# MEM·peranto

Okaze de la 63-a UK en Varna oni organizos la 8an ĝeneralan konferencon de Mondpaca esperantista movado. La 25jara jubileo de MEM donas al ĝi specialan gravecon. Al tiu ĉi jubileo devus digne kontribui ankaŭ la ĉs. MEM-anoj, kiuj ĉiam apartenis al la plej aktivaj adeptoj de la paĉideoj per MEM. Por aŭtuno 1978 estas preparata sekcia konferenco, kiu resumos niajn ĝisnunajn atingojn kaj okupiĝos ankaŭ pri la proksimaj taskoj.

Pro tio ĉiuj MEM-perantoj, ĉiuj lokaj grupoj de ĈEA estas petataj laŭeble senprokraste sendi al ĈEA konkretan raporton pri sia agado ekde 1976, ev.siajn planojn kaj sugestojn.Helpu progresigi la rolon de MEM kaj de nia tuta movado. Ni atendas viajn respondojn!

---



## KRONIKO

Anna H e j n o v á , el Prago mortis 21.4.1978 en Červený Kostelec, en la ago 83j. Ŝi estis vigla aplikantino de Esp-o en interŝango de kulturaj valoroj.Postrestis en manuskripto kelkaj ŝiaj librotradukoj en kaj el Esp-o, ekz.pri A.Schweitzer.

Kun malfruiĝo ni gratulas okaze de la 75a naskiĝfesto al Josef S t a n k u š el Poruba, al Valdemar V i n a ř , kiu sepdekjariĝis la 31.5. kaj al Jana C í c h o v á, kiu festis sian naskiĝdatrevenon la 14.4.

Forpasis en Příbram 4.4.78 aktiva membrino de ER Anna S E D I V Á en la ago 75 jaroj.

# RONDETA VIVO

B R N O – La 16.5. okazis jarkunveno-konferenco de Klub školství a vědy B.V. en Brno, kies aktivecon dum la du lastaj jaroj prezentis ties direktorino B.Čápková. Sekvis multaj alparoloj kaj vigla diskuto, kiun partoprenis ankaŭ Z.Hršel, prezentinte la agadon de EK kaj plurajn aspektojn de la movado. – En la baza naŭjara lernejo por viddifektaj infanoj parolis la 18an de marto d-ro F.Foit antaŭ ĉ. 190 ĉeestantoj pri Esperanto. – Jurnalo "Brněnský večerník" aperigis la 21.4. ampleksan intervjuon kun A.Růžičková-Pavlínová, eminenta anino de Teatro de fratoj Mrštík, sub la titolo "Alena Růžičková aneb Esperanto a svět".

Č E S K É B U D Ě J O V I C E – "La Progreso" informilo de la loka EK ekaperis en alloga koverto k. kun interesa enhavo (ekz. rubrikoj El scienco kaj tekniko, Por libera tempo, artikoloj Invito al Písek, Sudbohemia popola arkitekturo).

F R Ý D E K - M Í S T E K – La 21.5. parolis A. Milatová en kafejo Esperanto pri la temo: "La liberigon mi travivis en Prago", la 16.4. F. Stranánek (Trans Romon al Pireneoj).

H A V Í Ř O V – Fervojista sekcio de ČEA okazigos sian jarkunvenon la 26–27an de aŭgusto en la hotelo Merkur. Pli detalaj informoj ĉe ing.Z.Polák, Rudoltice 95, 563 01 Lanškroun.

H O D O N Í N – Filatelista Klubo kunlabore kun EK aranĝis la 23.4. ŝobian "Pulo-Foiron" kun tutŝtata partopreno de ĉiaspecaj kolektistaj fakoj.

K A R L O V Y V A R Y – Informa ŝranko de EK estas lokita en frekventata strato sur la hotelo "Národní dům". Pro la aktuala, interesa kaj alloga arango de la ekspoziciata materialo, la urbanoj kaj eksterlandaj gastoj estas bone informataj pri la celoj de nia movado. Tiun ĉi informan agadon alte taksas la urbaj kaj politikaj organoj (vidu la foton). La klubo sukcese partoprenas en la kultura kaj eduka agado de la urbaj aŭtoritatoj.




L A N Š K R O U N – Pri siaj travivaĵoj en Kubo prelegis en la "Societa domo" kun diapozitivoj S. Nekvinda. Partoprenis ĝin pli ol 70 aŭskultantoj, precipe junaj. – EK ricevis la 19.4. diplomon pro sia kultura agado, okaze de la konferenco de la Societa domo.

O L O M O U C – Pri la 62a UK en Rejkjaviko parolis antaŭ la EK-anoj d-ro I. Ferenczy el Gyor. Ĉeestis esperantistoj el Přerov, Prostějov kaj Šumperk.

O S T R A V A - El programoj pro majo kaj junio : 10.5. Vojaĝo al Italio (Samek), 24.5. Inter Konstanco kaj Kopenhago (Bartovská),27. 5. Smaženice - Kyjovice, ce muziko kun la tradicia ekskurso, 31.5. Projekciado de Esp.filmoj pri Nov-Zelando k. Balado el Dagestano, 14.6. Inauguro de Esperanto-Ekspozicio, 21.6. Skribaj ekzamenoj pro komencantoj.

P R A G O - Inter la lastatempaj programoj de la klubo, kies kvalito respeguliĝas en la kreskanta nombro de la partoprenantoj,interesaj estis prelegoj pri M.Kuděříková (Josková),pri la esperantistaj"minitravivaĵoj" (J.Vítek), pri la Internacia Tago de Virinoj (Bendová),pri la problemoj de interlingvistiko (d-ro Jermář), pri la printempaj gardenlaboroj( L. Kynčl) k.a. Interesiĝon vekis ankaŭ lumbildaj prelegoj pri Sudafriko (geedzoj Štifter), pri Vieno kaj ĝia cirkaŭaĵo (Kukačka), pri Nederlando (Mráčková). La plej grandan entuziasmon vekis la teatraj prezentadoj de E.Seemannová, ekz.la monologa tutvespera dramo "Johano kaj mi" aŭ "Nia sinjorino Božena Němcová", "Patrino de murdinto" de Kisch, "Ekskurso de mortaj knabinoj" de Seghers, k.a., kiujn Seemannová mem esperantigis. Emociiga estis ankaŭ la rakontado de E. Urbanová pri sia poezia verkado.

/J.Patera/

P Ř Í B R A M - Jam la tria ekspozicio pri Esperanto, kiu entenis historian,literaturan kaj hobian partojn, okazis en konstanta ekspoziciejo de Urba kleriga konsilantaro inter la 13a k. 18a de marto.

T Á B O R - Regulaj kunvenoj de EK okazas ekde la 3.4. en Střelnice, ĉiulunde inter la 20-21a h. La 22an de aprilo okazis kunlabore kun Klubo de laboruloj kaj aliaj organizaĵoj printempa marŝo "Kun Esperanto de burgo al burgo". La 15.5.oni okazigis en la klubejo letervesperon. - "Táborský zpravodaj" publikigas ĉefilingvan rubrikon pri la I.L.

Z N O J M O - EK aranĝis la 20.4. "Vesperon en Esperanto" kun ekspozicio de bildkartoj kaj suveniroj el Japanio, Tahitio k.a. landoj. Multnombra partopreno. - Esperanto-Rondeton en Distrikta domo de junpioniroj por 15 infanoj sukcese gvidas S. Šupíková. En aprilo ŝi aranĝis tie ekspozicion de bildkartoj kaj leteroj, kiujn la Rondeto ricevis.

/vr/

## DIVERSAĴOJ

SENDU KONTRIBUAĴOJN por la IIa Internacia ekspozicio de infandesegnaĵoj okazonta sub la devizo "Infanoj de Siberio amikoj de la tutmonda infanaro". Bv. noti la adreson kaj ĝin. Esperanto klubo, p.k.11, Barnaul - 99, 656099, USSR. Liveru laŭeble div.eldonaĵojn pri kaj en E-o, speciale kun studentaj temoj.

MALKOVRITA POEMARO DE KALOCSAY. UEA aperigis belan faksimilan represon de la "perdita" poemaro de K.Kalo-




# TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY
## /Feruzino de Třinec/
## de Granda Oktobra socialisma revolucio

# TESLA ĈEĤOSLOVAKA PRODUKTANTO DE ELEKTRO

La plejparto de esploro, disvolvo kaj produktado de elektronika kaj malfortkurenta industrioj, reprezentas en Ĉeĥoslovakio la produkta ekonomia unuo Tesla. Ĝi reprezentas 21 produktajn entreprenojn, 5 esplorinstitutojn, disvolvan entreprenon por raciigo, kaj komercan entreprenon Tesla, kies konstistaĵo, krom reto de vendejoj, centroj por longtempa luado de televidiloj Tesla-Multiservis kaj servosistemo, estas ankaŭ Centro por kalkulteĥniko Tesla kaj entrepreno Nukleoteĥniko. Pli ol 50 organizaj unuoj estas harmonie dislokitaj sur teritorio de tuta respubliko.

La vasta elfar-programo enhavas proksimume 70.000 produktojn, el tio ĉirkaŭ 7.000 fin-elfaraĵojn, estas saturita per propra konsistaĵ-produkto, bazita sur mikroelektronaj transistoraj elementoj. La produktado koncentriĝas ĉefe en fakoj: telekomunikaj aranĝaĵoj, radi- kaj televid-elsendiloj, studiaj ekipaĵoj por radio kaj televido, elektronaj mezuriloj kaj elektronaj mikroskopoj, elektroniko por medicino, kalkul-teĥniko, NC-sistemoj, sekurigaj aranĝaĵoj kontraŭ enrompo kaj incendio, elektroniko por teks-industria maŝin-konstruado, lum-fontoj kaj konzuma elektroniko.

La signifo kaj amplekso de liveraĵoj de elektronikaj ekipaĵoj por la ĉeĥoslovaka nacia ekonomio konstante altiĝas. La elektroniko staras frunte de la scienc-teĥnika progreso en ĉiuj ĝiaj branĉoj. Ĝi valoriĝas en direktado de produkt-procedoj en la maŝin-konstruado, energetiko, minejoj, metalfandejoj, laminatejoj, transporto kaj vico da pluaj produktadbranĉoj, inkluzive tiujn, kiu estis ĝis nun netradiciaj por elektronikaj aranĝaĵoj, kiel estas la medicino, edukado kaj kulturo.

Dekdu ĉapitroj pri la sindefendo

La aŭtoroj: Inĝ.J.Novák kaj Inĝ.I.Špička

## VII.

Ekzistas taktikaj instrukcioj, kiuj, se oni uzadas ilin korekte, donas al la defendanto egan probablon venki ne nur laikon, sed ankaŭ eĉ homon, kiu regas bone batalagojn, eventuale kiu en certa grado scipovas ankaŭ la taktikon. Tio nature postulas de li tre detalan studadon ne nur de la batalagoj mem, sed speciale, de la taktiko por ilia utiligo. Tio daŭras memkomprene multe da jaroj. Tamen plimulto el la legantoj de tiu ĉi artikolaro plej verŝajne estos kontenta eskapi kun "sana haŭto" el danĝeraj situacioj kaj certe ne koleros pro nescio sendanĝerigi kontraŭulon ekzemple per unu eleganta rektmanfrapo, trafante lian mentonon. Kion do fari? Antaŭ ĉio estas necese pripensadi, kiamaniere estiĝas la sindefendo-situacioj. Ilia estiĝado ofte inkludas ankaŭ ŝlosilon al ilia solvo. Plej bone estos klarigi ĉion per ekzemplo. Ni imagu, ke sinjoro X iras vespere hejmen. Subite li antaŭ si ekvidas ĉe la malproksima stratangulo aron da vagabondoj, pri kiuj li havas motivon opinii, ke ili ĝenos lin. Kion li faros? Li povas ekzemple elekti por sia irado alian straton (aŭ vojon), transiri straton kaj daŭrigi sian vojon sur la alia trotuaro, aŭ li povas simple aliri la aron kaj klopodi trairi ĝin. En kiu okazo estos la probablo de batalrenkontiĝo la plej granda estas certe evidenta. Sinjoro X povas per sia prudento kaj anticipado de ebla evoluo de la situacio la danĝeron de atako kontraŭ sia persono aŭ pligrandigi, aŭ malpligrandigi. Jus priskribitan manieron de kondutado fare de la batalanto (ĉi-loke: de la defendanto) estas unu el specoj de la t.n. produktado de la sindefendo-situacioj. Simile se sinjoro X estas revenonta hejmen vespere aŭ tra malbone prilumita strateto aŭ strato bone prilumita, aŭ se li povas veturi per aŭtomobilo, li ĉiam elektu la eblecon malpli danĝeran. Se tio ne eblas, li preparos sin por batalrenkontiĝo. Tio signifas, ke, se li ne estas armita, li provizos sin per oportuna okaza armilo (ŝtono, bastono ktp.) kaj decidos efektive sendanĝerigi atakunton per senkompata atakago. Tiamaniere sinpreparita li ekiros. Li ĉiam elektu tian trajektorion de sia translokiĝado, ke la atakunto ne povu neatendite proksimiĝi sin al li. Do ekzemple, en danĝera regiono li ne iros proksime de domoj, ĉar el la ombro de pord(eg)oj povas prikaŝita atakunto neatendite ekataki lin; la samo validas ankaŭ pri tro proksima preterpasado de dikaj arboj, amasoj de diversaj materialoj ktp. Diade similaj objektoj oni klopodu teni sin ĉiam tiel diste, ke oni havu sufiĉe da tempo defendi sin aŭ ataki. Ankaŭ estas nepermeseble subite eliri el bone prilumita loko en la malbone prilumitan(kaj male), ĉar en ĉi okazo oni estus plej verŝajne brilblindigitaj kaj sekve nebatalpovaj ktp.

Se oni ne povas fidi dum batalrenkontiĝo la propran atakon, oni fuĝu. Tamen kuri kapablas ankaŭ la atakanto. Do se oni kondutu enkadre de la III-a postulato de la sindefendo, oni devas al la kontraŭulo en sufiĉa mezuro malfaciligi la postsekvadon. Ofte sufiĉas al ĉi celo "vipobati" la kontraŭulan vizaĝon per poŝtuko, kiun oni tenas je unu angulo, aŭ ĵeti tien manplenon da sablo, koto, ktp. En multaj landoj oni fabrikas por tiu ĉi celo diversajn la t.n. specialajn rimedojn, per kiuj oni povas por nelonga tempo la atakanton blindigi (ekzemple per speciala gaso aŭ likvaĵo), makuli per neforigebla farbo aŭ abomena fetodoro. Tamen la lasta rimedo ne estas tro fidinda. La vorta minaco, kion oni faros, se la kontraŭulo daŭrigos agresan kondutadon, ne estas ofte sufiĉe efika, ĉar la atakanto ne estas devigita kredi al oni aŭ li ne kapablas pripensi konsekvencojn de sia primakulado. Nokte ofte sufiĉas brilblindigi atakanton per lumo de poŝlampeto ktp.

Certe ne havas sencon nombri ĉi-loke diversajn eblecojn, kiamaniere influi estiĝadon kaj evoluon de propra batalrenkontiĝo, do produktadon de la sindefendo-situacioj, aŭ kiamaniere plifaciligi sian fuĝon. Ĉiu leganto mem certe facile trovos multajn aliajn bonajn eblecojn kiel konduti en la supre traktitaj situacioj kaj sen malfacilaĵoj trovos laŭ ĵus enkondukitaj modeloj sian plej oportunan solvon de danĝera situacio, kiu respondas al liaj eblecoj, kaj la fizikaj, kaj la psikaj. Ĉi-loke ni volas nur atentigi, kien estas necese alceli sian penon kaj pensadon.

## VIII.

Atakon, kiun oni efektivigas kontraŭ la batalanto nescianta ĝis ties komenco, ke li estas en batalsituacio, ni nomas la insidatako. Se ĉiuj batalantoj scias, ke ili estas en la batalsituacio, ni parolas pri la t.n. interbatalo. La antaŭan ĉapitron oni povas kompreni antaŭ ĉio kiel klopodon eligi per oportuna produktado de la situacio la eblecon de la insidatako fare de la atakanto.

Se ni pensas pli detale pri la problemaro de la insidatako,ni vidas, ke ĝi reprezentas idealan atakon, ĉe kiu la atakanta batalanto riskas nur ne multe. Sekve el la vidpunkto de la III-a postulato de la sindefendo ĝi estas por la defendanto la plej oportuna ebleco, kiel komenci la batalon. Ĉi-loke eble plimulto el la legantoj estas surprizita: ĉu oni en ĉi okazo ankoraŭ rajtas paroli pri la sindefendo? Por solvi la problemon, ni revenu al la difino de la sindefendo-situacio. Estas evidente, ke la sindefendo-situacio ne ekestis tiam, kiam la atakanto jam estas klopodanta trapiki la defendanton per tranĉilo aŭ bati lin per pugno, sed jam en la momento, kiam ekkoliziis iliaj celoj. Ne gravas, se la atakanto tion scias aŭ ne. Nur etika graveco de la celoj decidas, ĉu oni povas uzi ekstremajn formojn de perforto aŭ ne. Ĉu oni uzos por elimino de koincida atako fare de atakanto la insidatakon aŭ alian metodon, ne estas en tiu ĉi okazo decidiva. Certe estos plej bone demonstri ĉion per ekzemplo. Ni supozu, ke vi vidas sur la strato, ke du aŭ tri vagabondoj krude batadas senpovan maljunulon. Kion vi faros? Esence estas eble aŭ simple foriri, aŭ helpi lin. Memkomprene ĉiu bone edukita homo tuj forĵetos la unuan eblecon kaj iros helpi al la atakato. Se li ne estas sufiĉe brava, li klopodos alvoki al la maljunulo almenaŭ helpon. En la okazo, ke li mem kuraĝas kaj kapablas batali, li ne perdos tempon kaj ekagos, ĉar ĉiu plua bato povas al la maljuna homo kaŭzi alian gravan vundon aŭ morton. La defendanto do provizos sin per iu okaza armilo (se li ne estas armita) aŭ en la plej malbona okazo li batalos nearmita. Kion li faros plu? Li povas klopodi admoni la atakantojn aŭ postuli, ke ili lasu la maljunulon. La atakantoj ja povas lin obei, tamen pli verŝajne tio ne okazos. Estas ankaŭ eble, ke ili ja lasos la atakaton, sed nur por tio, ke ili povu per unuigitaj fortoj ataki la alveninton. Certe ne estas necese rememorigi, ke la defendanto-laiko troviĝus en tre danĝera situacio. Fine povas ankaŭ okazi, ke li mem, krom tio, ke enkondukos sin en malfacilan situacion, havuntan por li seriozajn konsekvencojn, ne helpos eĉ la maljunulon. Ni vidas, ke la ĵus priskribita maniero, kiel helpi al atakito, ne estas tro sekvinda. Tamen ekzistas ankoraŭ alia ebleco. La defendanto povas neokulfrape pliproksimiĝi al la atakantoj, kiuj ĝis nun ne ekrimarkis lin, ĉar tuta ilia atento celas al objekto de ilia agresemo. Poste li pritaksos, kiu el la atakantoj estas la plej agresema kaj tiun li sendanĝerigos neatendite per peza kiko celata la tibion aŭ la suron de la trafoto aŭ li surterigos lin per bato kontraŭ la mentonon. Antaŭ ol la ceteraj atakantoj orientiĝos en la nova situacio, li povas ekataki la

pluan atakanton. Poste kontraŭ la defendanto rezistas nur unu atakanto. Kiel montras la praktiko, en similaj neatenditaj ŝanĝoj de evoluo de situacio la ceteraj atakantoj plejofte disfuĝas kaj tio ekestas eĉ en okazoj, kiam da ili estas pli granda kvanto.

Cetere neniu objetos ion kontraŭ la procedo, kiun elektis la defendanto en la ĵus pritraktita ekzemplo spite de tio, ke li uzis la insidatakon por malebligi koincidan atakon fare de la unua atakanto. Nur poste komenciĝis la interbatalo. Estas evidente, ke eĉ la insidatakon oni ne povas ĝenerale trakti kiel nehonestan aŭ senmoralan. Sekve, en ĉiuj okazoj, kiam ĝi estas morale kaj etike pravigebla, oni uzu ĝin.

## IX.

Se oni instrukcias iun premi per fingro premilon (reago) tuj poste, kiam eklumiĝos antaŭ li lokita lampeto (signalo), menciita premago komencos nur post certa tempo. Tiun ĉi tempon oni nomas simpla reagotempo kaj ĝi povas daŭri 0,18s, se la provatulo(1) estas antaŭekzercita por koncerna simpla reago. Ĉe pli komplikaj movoj, kiuj reprezentas la reagon, ĝi povas daŭri eĉ 0,3 - 0,5s. En la okazo, kiam povas ekaperi kelke da diversaj signaloj, laŭ kiuj oni reagu, la reagotempo (la t.n. reagotempo kun elekto) estas rimarkinde pli longa ol ĉe la simpla reagotempo. Tute analoge en okazoj, kiam la signaloj estas malbone distingeblaj aŭ se oni povas laŭ unu signalo reagi per pli ol unu reago. La reagotempojn plilongigas ankaŭ ege komplikaj reagoj, iuj emociaj statoj, laceco, neoportuna direktiĝo de menso ktp.

Por ke ajna defendago estu sukcesa, ĝia daŭro kaj la daŭro de reagotempo devas esti ne pli longaj ol estas la daŭro de la atakago fare de la atakanto. La malo validas por sukcesa efektivigo de atakago. Se ni komparos daŭron de simplaj reagotempoj kun daŭro de rapidaj frapoj, ni konstatos tre interesan fakton: la daŭro de rapidaj frapoj estas kunmezurebla kun la daŭro de la simplaj reagotempoj! Do ekzemple la rektmanfrapo laŭ niaj mezuradoj estas efektivigebla en proksimume 0,16s, la elsuba krurfrapo kontraŭ la tibion en 0,17s ktp., kaj la simpla reagotempo daŭras, kiel ni jam diris pli supre, 0,18s. Memkomprene post la reagotempo devas sekvi ankoraŭ oportuna defendago. La plej rapida defendago, kiun oni povas utiligi por defendi sin kontraŭ la rektmanfrapo, estas la kapodevio dorsen, daŭranta laŭ niaj mezuradoj proksimume 0,1s. Tamen en reala batalo oni renkontas plejofte reagotempojn kun elekto, kaj tiuj estas, kiel ni jam diris, ege pli longaj (kutime kelke da sekundoj). Se la defendanto reagas nur post komenco de movo fare de atakanto, li estus necese nesukcesa ĉiam, kiam la atakanto uzus rapidan kaj pezan baton, aŭ kikon celatan kontraŭ gambojn. Se li spite de tio iam kaj tiam senvalorigus ian frapon, tio povas esti konsekvenco aŭ de la anticipado (la atako estas efektivigita ekzemple senprokraste post elpaŝo de atakanto al la defendanto), aŭ la frapatako estis tro malrapida aŭ signalita.

Kiel estas evidente el ilia enhavo, tiun ĉi kolizion inter la eblecoj reagi kaj la postuloj rilate al reagado oni en klasikaj batalkompleksoj de la sindefendo (la ĵuĵucuo, la karateo ktp.) ne konsciis. Alie oni ne povus envicigi en ilin sen plua klarigo batalagojn kontraŭ kapto de brako, vesto ktp. (la defendanto ne malhelpis al la atakanto pliproksimiĝi je atingo de la mano) kaj la defendagojn kontraŭ frapoj, kiel ekzemple diversajn paratojn(2). Se la atakanto havis sufiĉe da tempo kapti la defendanton, kial li ne estus havinta sufiĉe da tempo bati lin (la bato korekte efektivigita estas ĝenerale pli rapida ol la koncerna kapto)? Cetere pli supre enkondukitaj tempobilancoj parolas klare. Analoge klare parolas ankaŭ rezultoj de konkursoj inter la

boksistoj aŭ inter la karateistoj, en kiuj oni vidas ja tre ofte reciprokan trafadon de kontraŭuloj, tamen kontraste nur tute eksterordinare sukcesan defendagon efektivigitan en la distanco, ĉe kiu la batalantoj atingas sin reciproke per brakoj. Klarigi tion nun jam certe ne faras problemojn.

Se ni eliru, konstruante la taktikon de la sindefendo, el la III-a postulato de la sindefendo, oni devas ne supozi, ke la batalagoj fare de la atakanto estas signalitaj aŭ malrapidaj kaj ke li mem estas nekapabla aŭ sen bazaj taktikaj scioj. La pli supre menciita kontrasto inter la eblecoj reagi kaj daŭro de rapidaj atakagoj inspiris en la jaroj 1954 - 1960 aŭtoron Inĝ.I.Špička (Špička) al tio, ke li komencis solvi problemojn de la sindefendo tute alie, ol oni faris tion ĝis tiu ĉi tempo. Pri tio ni kontinuigos la klarigon en la sekvonta ĉapitro de la artikolaro.

---

1 PROVATULO estas homo (persono), kiu servas kiel objekto de ia eksperimento.

2 PARATO (en la sindefendo aŭ batalsportoj /karateo, ĵudo, bokso,.../ ) estas ajna defendago, per kiu oni klopodas aŭ haltigi la frapon, aŭ deviigi ĝin ekster la frapcelon per movoj fare de propraj membroj aŭ armilo.

X.

Rilate la taktikon, ni ĝis nun montris, kiamaniere eviti la sindefendo-situaciojn aŭ kiel por senriskigi propran atakon, de koincida hazarda aŭ intenca atakago fare de la kontraŭulo, profiti la insidatakon. Logike sekvu klarigo pri la interbatalo. Tamen la taktiko de la interbatalo estas mem relative komplika kaj por kompreni ĝian esencon estas necese havi iujn specialajn sciojn. Sekve ni nun sciigos la legantojn pri ili.

Se ni reagas laŭ io, kio jam ekestis, ni estus en multaj okazoj sukcesaj. Do ekzemple, se la atakanto kaptos nian brakon per la dekstra mano, ni povas liberigi ĝin kaj komenci atakon ekzemple per oportuna rompumo. La reagado laŭ io, kio jam ekzistas kiel fenomeno, ni nomas kvazaŭsignala. La kvazaŭsignala reagado tamen malsukcesas, se la atakago estas tro rapida kaj ĝia efiko nekorektebla. Do ekzemple, se la atakanto efektivigus korekte rektmanfrapon sen senpere antaŭiranta translokiĝo al la trafoto, kaj la defendanto klopodus reagi nur post ĝia eko, li estus neeviteble malsukcesa, kiel ni jam klarigis.

La plua speco de la reagado estas la t.n. multsignala reagado. Reagante tiamaniere, la defendanto anticipas el la signoj de la situacio la plej verŝajnan agadon de la atakanto kaj surbaze de ĝi li agas. Memkomprene tiu ĉi anticipado estas nepre probableco; anticipata afero povas, tamen ne nepre devas okazi, estas eblaj ankoraŭ aliaj evoluoj de la situacio. Kaŭze de tio ankaŭ la nomo de la reagado: la multsignala.

Ekzemplo de la multsignala reagado en batalo estas sukcesa elekstera parato, per kiu la defendanto demetis ne sufiĉe rapidan aŭ tro signalitan rektmanfrapon fare de la kontraŭulo flanken disde ĝia celo. Ci-loke la defendanto (post longa ekzerciĝado) subkonscie laŭ alirantaj signoj de la situacio post ilia prilaborado elektis la plej verŝajnan alternativon de la agado fare de la kontraŭulo kaj surbaze de ĝi li agis. Do ne laŭ io, kio jam okazis, sed laŭ sia supozo pri la evoluo de la situacio. La multsignala reagado ebligas jam pli efike konduti en batalo ol la kvazaŭsignala. Se temas pri la klasikaj batalkompleksoj (la ĵuĵucuo, karateo,...), la analizo de ilia enhavo videbligas, ke oni uzadis en ili kiel la kvazaŭsignalan, tiel en iuj kazoj la multsignalan reagadon.

# IKAĴOJ KAJ MALFORTKURENTAJ TEĤNIKAĴOJ

Sed la produkt-unuo Tesla kovras per sia produktado ne nur postulojojn de la enlanda merkato. 30 proc. de amplekso de la produkto reprezentas liveraĵoj por eksporto. La plej grava komerca kunulo por la ĉeĥoslovaka elektronika kaj malfortkurenta industrio estas la Sovet-Unio kaj aliaj landoj de la socialisma komunumo. Signifa parto de la eksporto estas direktata ankaŭ al evoluintaj kapitalismaj ŝtatoj de la Okcidenta Eŭropo.

La larĝeco de produktata sortimento kaj rapida teĥnika progreso en ĉiuj prizorgataj branĉoj akompanas kreskantajn postulojn je esploro kaj disvolvo, je neceso de specialaj teĥnologiaj aranĝaĵoj kaj materialoj de alta pureco.Ĉi tiujn kaj vicon de pluaj kondiĉojn por plua sukcesplena disvolvo de elektronika industrio ne eblas sekurigi ekonomie kaj efike sen vasta internacia kunlaboro, en ĉiuj ĝiaj formoj, ĉefe en specialiĝo kaj kooperado en la produktado kaj scienc-teĥnika kunlaboro. La partopreno de la ĉeĥoslovaka elektronika kaj malfortkurenta industrio en la internacia kunlaboro kaj divido de laboro ĉiam profundiĝas. La produkt-unuo Tesla estas ankaŭ membro de kelkaj internaciaj organizaĵoj, el kiuj eblas mencii la internacian kuniĝon Interatominstrument(IAI), Interelektro, Intetetalon pribor.

La produktad-unuo Tesla, kiu disponas per ampleksa produkta kaj disvolva bazo, relative granda teĥnika potencialo de fakaj laborantoj, havas ĉiujn kondiĉojn por plenampleksa plenumo de starigitaj taskoj en postulata kvalito por kontentigo de siaj klientoj en- kaj eksterlande.

## INVITO AL BRNO

La partopreno de la produkt-unuo Tesla en la 20. internacia maŝin-konstrua foiro en Brno estas tradicia okazo por ligi komerciajn kaj teĥnikajn kontaktojn kun niaj kaj eksterlandaj kunuloj. Tesla prezentos tie en la ekspozicio de ĉeĥoslovakaj entreprenoj de ekstera komerco parton de vasta sortimento de produktoj de investa elektroniko.

1833 - 1978

145 LET

VPM

VÁLCOVNY PLECHU
(Laminatejo)
nacia entrepreno
FRÝDEK-MÍSTEK

Premiito per la Labor-ordeno de Klement Gottwada
por la konstruado de la socialisma patrujo
kaj la Ordeno de Venka Februaro

csay, "Izolo". La libro havas unikan historion - kiel rakontas en la antauparolo W. Auld, la unua eldono, kiun abortigis la militeksplodo en 1939, estis kvinekzemplera. La hodiaua fotorepreso havebligas unuafoje al la Esperantista publiko parton de la heredaĵo de tiu ĉi granda poeto. Dum preskaŭ duonjarcento reprezentiĝis la originala poezio de Kalocsay esence nur per la "Streĉita kordo".

EN MASKOBALO de Julio Baghy. Kvin unuaktaĵojn el la jaroj 1922-1957 eldonis HEA omaĝe al la 10a datreveno de lia morto. Redaktis Maria Benczik.

HISTORIO KAJ BIOGRAFIOJ. Tre konciza superrigardo por bezono de SET en Lanĉov. Kompilis J. Vondroušek, 29 paĝoj.

LETERO DE LEGANTO. Responde al la artikolo en februara n-ro de Komuna Esperanto-Gazeto (Naciismo kaj esperantismo) skribas al la gazeto s-ro A. Jandík el Kyjov: La artikolo volas aserti, ke "Hitler fine akiris la Sudetogermanojn al sia flanko ne ĉar ili parolis la saman lingvon, sed ĉar la ĉeĥa registaro komencis socie subpremi tiujn germanojn"ktp. Kaj plue, ke "la politiko de la ĉeĥa registaro ekbruligis la fajron". Laŭ la aŭtoro, se ne ekzistus ĈSR, ne povus okazi la mondmilito. Mi petas ne plu sendadi al mi vian gazeton, kiu sole ne estas neŭtrala, sed kontraŭe hitlerisma. La artikolo ne estas subteno al zamenhofaj ideoj.

# RENKONTIĜO EN MĚLNÍK

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, LG de Pacdefendantoj en Mělník, invitas al la IX-a INTERNACIA RENKONTIĜO, okaze de la 60-jara ekzisto de la respubliko kaj 30 jaroj de socialismo en Ĉeĥoslovakio.

Programo:

6.10. (20-a h.): INTERKONA VESPERO en la kampadeja restoracio

7.10. (10-a h.): en la Kastela korto FESTA BONVENIGO, promeno super la kunfluo de Elbo kaj Vultavo, ev. vizito al kastela vinkelo kaj bildgalerio

(12-a h.): KOMUNA TAGMANĜO en Kastela vinejo

(14-a h.): laŭ propra elekto:
a) aŭtobusa vizito al DOKSY,
b) aŭtobusa ekskurso al la monto ŘÍP,
c) promeno (4 km) - parko kaj kastelo en HOŘÍN

fakaj gvido a) 25 Kĉs, b) 15 Kĉs; starto de la ĉefplaco

(19-a h.): DANCVESPERO en Kastela vinejo ĝis la 0,30-a horo - enirpago 15 Kĉs

8.10. (10-a h.): KULTURA MATINEO en Kulturdomo de O. Jaroš kun artistoj el Drezdeno, enirpago 15 Kčs

Tranoktebleco (nur por ambaŭ noktoj):

KAMPADEJO A: kvarlitaj kabanoj hejtitaj - MĚLNÍK
HOTELO B : 14 km - aŭtoposedantoj: hotelĉambroj kun matenmanĝo - KOKOŘÍN

TUJ ALIĜU, PETU INFORMOJN DE "ESPERANTO", poŝtkesto 25, 276 80 MĚLNÍK (ne skribu kampadejo, nek hotelo, al ni!).

# * EL * EKSTERLANDO

POLLANDO - La 8an de aprilo okazis inaŭguro de la Aperta Universitato Esperantista en Lodzo. En la programo de la solenaĵo estis paroladoj de mag.J. Wesołowski kaj doc.d-ro M. Dobrzynski, prez.de PEA, plue lekcioj de prof.d-ro B.Lewicki "Aŭdvida lingvo kiel ilo de internacia komprenigo" kaj de doc.M. Dobrzyński: "Kvalito de la vivo - kvalito de laboro".

Internacian teatran renkontiĝon, kiu okazis sub la aŭspicio de UEA en Gdańsk (19.5. - 4.6.) partoprenis teatraj ensembloj el Bulgario, Finnlando, Francio, Pollando kaj Sovetio.

ITALIO - Por plivigligi interesiĝon pri Esperanto la Kampanja Esperanto-Centro en Neapolo proponas starigi "Esperantan tagon" en la tuta mondo. En tiu ĉi tago oni devus el ĉiuj landoj postuli aplikadon de E-o en internaciaj rilatoj de diversaj politikaj kaj kulturaj organizaĵoj kaj institucioj.

KUBO - Esperantistoj, kiuj intencas partopreni la XI-an Mondfestivalon de junularo kaj studentoj en Havano, julion 1978, skribu anticipe al Kuba Esperanto-Asocio, PK. 314, Habana 1, Kubo.

USONO - "Tutmonda Diplomato" ĉi tiun premion, kiun atribuas Studenta Klubo en Usono, ricevis ĝis nun U Thant, Karl Waldheim kaj ambasadoroj el Libano, Tanzanio, Brazilo kaj Francio. Pasintjare ĝi estis donita al ambasadoro de Aŭstralio, esperantisto R.Harry.

HUNGARIO - Vinrikoltan renkontiĝon en pitoreska baroka urbeto Sopron (ĉe la hungara-aŭstria landlimo) aranĝos la E. grupo Pacemo.

## ESPERANTSKÁ OLYMPIÁDA

Mládežnická komise ČES ve spolupráci s Pedagogickou sekcí vyhlašuje 1. kolo Esperantské olympiády.Všichni účastníci, kteří splní podmínky soutěže, postupují do dalšího, náročnějšího kola. Bez účasti v prvém kole není možná účast v kole druhém.Uzávěrka 1. kola je 15.10.1978. Nejlepší práce budou slosovány a odměněny. Své práce

# JAWA 634-8

JAWA 634-8

JAWA 634-8

havas
ĉiujn
bonajn
proprecojn
de konata
marko



Produktas JAWA n.p. TÝNEC nad SÁZAVOU

zasílejte na adresu: Miroslav MALOVEC, Slovákova 9, 602 00 BRNO. Uveďte jméno a příjmení, datum narození, adresu a toto písemné prohlášení:

"Přihlašuji se do 1. kola Esperantské olympiády a prohlašuji na svou čest, že jsem splnil(a) podmínku soutěže, tj. že jsem úkoly odnikud a od nikoho neopsal(a), nýbrž jsem je vypracoval(a) sám(a) bez cizí pomoci.

V...,dne...1978. Podpis.

Užívejte archů papíru formátu A4 a pište, pokud možno, strojem.

ÚKOLY 1.KOLA ESPERANTSKÉ OLYMPIÁDY:

1) Vyberte si z následujících slov jedno, vytvořte z něj aspoň 10 odvozenin nebo složenin a užijte je ve větách: sana, ridi, nova, trovi, grava, prunti, kuŝi, ĉesi.
2) Přečtěte si aspoň jednu esperantskou povídku (článek) a napište esperantsky vlastními slovy stručný obsah.
3) Vlastními slovy napište esperantsky o sobě nebo o některé ze svých zálib.

---

# ) DOSTAT SE... (

Bylo mi přeložit satiricko-historickou povídku o cestujícím diplomatovi. V ní i větu: "Zůstala tedy jen republika B., kam se dosud nedostal."

Jsa pamětliv způsobu vyjádření, s nímž jsem se vícekráte setkal v literatuře, přeložil jsem: "Restis do sole la respubliko B., kien li ĝis tiam ne atingis". Mému příteli, význačnému esperantistovi, se nelíbilo použité sloveso a jeho spojení (atingi ien); doporučil nahradit je "kiun li ĝis tiam ne vizitis" nebo "kien li ... ne venis". Jistě dobré, ale podle mého citu je to opis, ne vystižení odstínu.

Poučme se tedy z literatury, knižní i časopisecké, o výrazech, odpovídajících našemu "dostat se někam" a trochu i o výrazu "dosahovat".

V prestižním literárním časopise Literatura Mondo (LM) nalézáme: atingi ien - dostat se někam; atingi en la unuan vicon - dostat se do první řady (LM a rovněž R.Hromada: Slovník č.-e, 1949); ŝi sukcesis reatingi Marokon - podařilo se jí dostat se znovu do Maroka (P.Thorsen a P.Neergaard v "Tra densa mallumo", Kopenhago, 1942, p.19). A V. Oljanov volá v povídce Elina Pelina (Paco, 5/1977, s.9): "Ale až tam se mu-

sel dostat? : "Sed ĉu ĝis tie li devis atingi? Ĝis tie? Mortigi homon! Dio, dio!" K originálnímu, dosud nevídanému řešení došel dr. Hradil a kol. ("Verda familio", 4/1977,s.5) : "Kam jsem se to až dostal?" - "Kien mi nur ĝisiĝis?".

V jiném spojení má atingi i význam stihnout: "Por ke ne atingu nin la sorto de Volapük" (Zamenhof - Z). V dalším spojení je třeba užít atingi (dosahovat do nebo sahat k) ve spojení s ĝis: "Oni ne povas kredi, ĝis kia grado atingas la facileco de tiu lingvo" (Z). České "dostat se do" v dalších případech je možno, případně i nutno přeložit i jinými výrazy, vhodnými podle situace: li trafis en kaptitecon; li trafis el sub pluvo en riveron (Z) - dostal se z bláta do louže. Ale nemůžeme použít atingi nebo trafi ve větě: nemohl se dostat do jeho kalhot (byly mu malé) - li ne povis eniĝi en lian pantalonon (LM); jak se to naň dostalo? ( ta cizí uniforma) - kiel tio venis sur lin? (LM); nedostal ze sebe ani slovo - li elbuŝigis eĉ ne unu vorton (Rotkvić); dostat se z izolace: - elveni el izolado; li havigis nur unu tonon el la violono (M.Stuttard) - dostal z houslí...; dostalo se mu důstojenství - li ekhavis dignon ("Espero katolika").

Přejeme-li někomu, aby "dostal za vyučenou", můžeme přihlédnout k R. Rossettimu v příkladu: "Nu, li ellernos, beata idioto!" A podle okolností jsou pro "dostat se někam"nebo "dostat někoho někam" vhodné další odstínové výrazy, např.: dostal ho do spojenectví s - li puŝis lin en aliancon kun; li ne povis supreniĝi (Devjatnin) - nemohl se dostat nahoru; li sukcese traigis sin antaŭen - dostal se úspěšně dopředu (zde má sloveso významový odstín - téměř " prodral se ... ").

Termín "dosahovat" možno vyjádřit i takto: La produktado de elektro sumos 39 miliardojn da kVh (dosáhne); la pliiĝo sumos 70 %jn - přírůstek dosáhne (bude činit).... (Oba příklady: M. Lukáš).

Vidíme, že nikoliv chudé - ano, naopak - je esperantské výrazivo pro naše dostat se někam, dosáhnout něčeho.

Připomeňme si zde také názor Zamenhofův (Respondoj,1911): "Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon ol seka teoria logikeco".

Jaroslav Mařík

---

## KORESPONDI DEZIRAS

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kcs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Jan MAZUREK, Wollmanova ul.6, 635 00 Brno - Bystrc, ČSSR, dez.kor.per b.k.kun ĉ.l.,pri recipr.vizito kun soc.landoj.

Krystyna Kuczyňska, 18j.lernantino, 58-160 Swiebodzice, Os.Przod.Pracy 2a/12,Pollando. • Jana Nahodilová,23j, 679 23 Lomnice u Tišnova 6, okr. Blansko, ČSSR • Intersangas kolorajn p.k.,gramofondiskojn: Josef Jelínek, p.schr.1, 435 13 Meziboří u Litvínova, ČSSR

Mgr.Jan Regulski,13-200 DZIALDOWO,str.Grunwaldzka 4,Liceum zawodowe,woj.Ciechanow. • Fezoj Ikswogor,36j,13-200 DZIALDOWO, str.Nidzicka 17/7 • Ewa Stabach,20j,06-500 - MLAWA, str.Padlewskiego 7 • Janusz Luba,06-500 MLAWA,str. Graniczna 84/2 • Grzegorz Kordalski,21j,06-545 LIPOWIEC KOSCIELNY,woj.Ciechanow • Roman Szlak,06-500 MLAWA, str.Graniczna 84/7 • Waldemar Kownacki,06-500 MLAWA, str.Graniczna 84/2 • Janina Szlak,06-500 MLAWA, str. Sienkiewicza 2/13 • Jadwiga Daszkiewicz,06-511 BIALUTY, DZWIERZNA,woj.Ciechanow. • Lidia Stodolna,06-500 MLAWA,str.Sienkiewicza 11/13 n. 43. • Grzegorz Rozycki,25j, 06-570 ILOWO,str.Nowa 9/4. • Stanislaw Jozwiak,40j,06-521 KOSINY 4,woj.Ciechanow. • Adam Szypulski,06-500 MLAWA, str.Ostraszewskiego 10 • Maciej Rembarz,06-500 MLAWA, str.Sienkiewicza 97 • Waldemar Wiecek,06-500 MLAWA, str.Jagiellonki 5 • Grazyna Siedlikowska,13-200 DZIALDOWO,str.Kochanowskiego 17 Wojciech Sieja,06-500 MLAWA, Klub "Esperanto", Swietlica zaklad obowia. • Edmund Szlak, 06-500 MLAWA,str.Sienkiewicza 2/13 n.71 • Andrzej Bolinski,06-500 MLAWA, str.Sienkiewicza 85 • Boguslav Kaczan, 06-500 MLAWA, str.Padlewskiego 4/6 n.18 • Ireneusz Gredzinski, 06-500-MLAWA, str.Sienkiewicza 1/13 m 22. • Barbara Ewertowska 06-500 MLAWA,str.Mickiewicza 10. • Elzbieta Ruszkowska, 87-100 Torun,str.Mickiewicza 32/4. • Janina Wozniak,13-200 DZIALDOWO, str. Jagielly 46/4. •

# / PLEJ MALOFTA LIBRO EN E-O /

La libro kun tia epiteto estas la fama verko "Raportaĵo de sub pendumilo" de la ĉeĥoslovaka Nacia Heroo Julius Fučík (fuĉiik), kompostita laŭ traduko de la renoma tradukanto Rudolf Hromada, en 1950. Ekzistis en la mondo sole du ekzempleroj, binditaj, faritaj el pres-provaĵoj de prespreta, sed poste ne plu uzita kompostaĵo. La Esperanta versio de la verko havis ankaŭ nekutiman sorton: Unu el la solaj du ekzempleroj estis, malfeliĉokaze, neniigita de heredinto de la tradukinto, dum la dua troviĝis eĉ ekster Eŭropo. Sed, post jaroj, ĝi tamen revenis en Ĉeĥoslovakion. La "Raportaĵo" ekzistas do jam sole en unu, presita, ekzemplero kaj estas tiel nepra unikaĵo de la Esperanta literaturo.

Alia raraĵo, en privata posedo en Praha, estas kopio de mallonga aŭtentika filmo pri la entombigo de L.L.Zamenhof.

/jm/

## INFORMACE SEKRETARIÁTU

PŘEDSEDNICTVO ČES sděluje všem svým členům, že vyloučilo z řad členů svazu Miloslava ŠVAČKA, nar.2.2.1941, bytem PENČICE 16, okres Přerov, protože během lonského Letního esper. tábora v Herborticích zneužil, jako jeho vedoucí, povolení k uspořádání tábora k jiným účelům, než byla výuka esperanta a tím se hrubě provinil nejenom proti příslušným zákonným ustanovením, ale i zájmům svazu. LET v Herborticích nebude až do dalšího rozhodnutí pořádán.

ŽÁDÁME VŠECHNY VEDOUCÍ SEKCÍ A KOMISÍ a výbory těchto orgánů svazu, aby neprodleně zaslali svazu návrhy plánů činnosti na rok 1979 včetně finančního plánu.

ÚSTŘEDNÍ VÝBOR ČES schválil návrh předsednictva svolat 3. sjezd svazu na dny 10. a 11. února 1979 do Prahy. Žádáme všechny vedoucí MS, aby projednali na svých výborových schůzích (pokud tak již neučinili) návrhy na delegáty sjezdu a nahlásili je nejdéle do 30.července t.r. sekretariátu svazu. Zároveň uveďte hodnocení jmenovaných, zejména jejich činnost ve vaší MS a veřejném životě v místě bydliště, politickou příslušnost a členství v ostatních společenských a zájmových organizacích.

Ostatní zájemci se mohou sjezdu zúčastnit jako hosté. Prosíme o vaši přihlášku, abychom vám mohli zajistit ubytování a stravování. Podle zájmu a potřeb rozhodneme o velikosti sálu, kde by se měl sjezd konat.

PŘEDSEDNICTVO ČES projednalo návrh sekretariátu na úpravu cen odznaků a rozhodlo, aby napříště byly ceny stanoveny takto:

| | |
|---|---|
| odznak hvězda na bílém poli (ø 6 až 9mm) | na 5,-- Kčs |
| odznaky, které dříve měly cenu 6,-- Kčs | na 7,-- Kčs |
| odznaky, které dříve měly cenu 7,-- Kčs | na 8,-- Kčs |
| slavnostní odznak (hvězda na zlatém poli) | na 12,-- Kčs |

Další ceny nových odznaků budou stanoveny individuálně a podle výrobních cen, které způsobily zvýšení cen u některých předchozích druhů.

PACO - ROČNÍK 1978. Všichni, kteří mají zájem o dobrou četbu, aktuální informace z celého světa, chtějí si dopisovat, hledají adresy a mají zájem kromě toho obdržet přednostně jako premii separát o historii MEM, které letos slaví 25 let své činnosti, nechť si urychleně objedná v sekretariátu svazu ročník PACO 1978. Kromě základní řady obdržíte další čísla z Japonska, NDR a naše nové národní číslo s velmi atraktivním obsahem! Předplatné pouhých 30,- Kčs ročně.

RADIO MOSKVO ricevis jam pli ol 500 leterojn el la tuta mondo kiel eĥo je esperantista dissendo komence de februaro. Petu daŭrigon kaj regulan dissendadon.

ĈEĤA ESPERANTO ASOCIO dediĉis al kongresanoj en Varna broŝuron pri ĈSSR kaj Esperanta movado kaj surtablan kalendareton. Oni trovos ĝin en la kongresmaterialoj.

NOVA ELDONO DE ĈEA estas broŝureto pri historio de MEM, kiun verkis O. Knichal kun grupo de kunlaborantoj. Ĝi kostos 8 kcs kaj estas mendebla en la asocio. Partoprenantoj de la UK havos eblecon aĉeti ĝin dum la kongreso.

NOVA INSIGNO "IFEK". Certe vi jam aŭdis pri Internacia Fiŝkaptista Esperanto-Klubo. Ĉu vi interesiĝas havi ĝian vere eksterordinaran 4-koloran insignon? Ni ricevis kelkajn el eksterlando. Ĝia prezo estas 11 kcs.

DENOVE SILONAJ SAKOJ kun Esperanta teksto estas aĉeteblaj en asocio. Prezo 15 kcs. Ni havas verdajn, ruĝajn kaj brunajn kolorojn. Sed verŝajne baldaŭ estos ankaŭ aliaj.

---

STARTO - tiskový orgán Českého esperantského svazu, Praha 1, Jílská 10. Řídí redakční rada: odpovědný redaktor O.Knichal, zástupce redaktora Dr. J. Jermář, CSc, členové: J. Cink, Z. Hršel, Ing. V. Kočvara, Zd. Křimský, J. Vondroušek. Grafická úprava: M. Labašta. Vychází 6x ročně. Tisk zajištěn výrobnou Technického ústředí knihoven při SK ČSR Praha. Roční předplatné 24,-- Kčs. Předáno do tisku: 15. června 1978.

supera sukceso
de la sportisto
estas



VRCHOLNÝM ÚSPĚCHEM SPORTOVCE

JSOU PŘESNÉ MODERNÍ HODINKY

klenoty

preciza * * moderna
horloĝo



## HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj obligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

Ĉ E Ĥ O S L O V A K A J  B A N L O K O J

- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

**BALNEA**

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU

o o o o o o o o o o o

BALNEA
PRAHA

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1

ĈEĤOSLOVAKIO

Tx: 122 215